

# Andromeda galaksio

La Andromeda Galaksio (Messier 31) estas galaksio en konstelacio Andromedo, laŭ kiu ĝi estis nomita.

En la astronomia katalogo de Messier ĝi havas la nomon “M31”. Ĉi tiu objekto estis jam en la originala versio de NGC-katalogo.

Ĝi situas ĉirkaŭ 2,52 milionoj da lumjaroj for de ni kaj estas la plej malproksima objekto videbla nudokule de sur Tero.

Ĝi estas la plej granda galaksio en la “loka grupo” de galaksioj, al kiuj apartenas nia propra galaksio, la Lakta vojo. Tiuj du galaksioj tiom proksimas, ke pro gravito ili proksimiĝadas, kvankam galaksioj malproksimiĝas. Post ĉirkaŭ tri miliardoj da jaroj la du galaksioj kolizios kaj unuiĝos, formante eliptikan galaksion.

La Andromeda Galaksio kaj la Magelanaĵ Nuboj estas la solaj galaksioj videblaj nudokule, la Andromeda Galaksio kiel svaga makuleto iom flanke de la tri laŭvicaĵ steloj de Andromedo. Sed fakte tiu svaga makuleto ne estas la Galaksio, kiu proksima kiom ĝi estas de la tero havas angulan diametron sepoblan tiun de la luno. Pro malfortigo de ĝia lumo nur la densega centro, tiaforme, videblas.

Retpaĝo: [www.traduki.de](http://www.traduki.de)

Teksto: [eo.wikipedia.org/wiki/Andromeda\\_galaksio](http://eo.wikipedia.org/wiki/Andromeda_galaksio)